

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).-

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 54

Melburno (Melbourne), Australio.

10 decembro 1924

AMERICAN LECTURESS VISITS AUSTRALIA.

"Edison has invented a gas that will wipe out an entire city in five minutes. We know that unless we work for universal peace we will lose our civilisation, and one of the most important ways of securing that peace is to strive hard for a universal language. That language can be none other than Esperanto."

So said Miss Martha L. Root, of Pittsburg, U.S.A., and a relative of the great American Statesman, Senator Elihu Root, when addressing a large gathering of Esperantists and their friends at the Sydney Esperanto Society's rooms on October 16th. Miss Root is what may be termed an "habitual traveller" employing most of her time in writing and public speaking for the benefit of Bahaiism and Esperanto. She has twice circled the world writing her impressions and speaking to audiences en route, has made three writing trips to Europe, has lectured through South America and Mexico and is now making a brief stay in Australia after a year's lecturing tour in China and the Far East.

"Bahai advocated a universal auxiliary language many years ago," said Miss Root, "and to-day 17 million people who follow and believe in the Bahai faith are studying Esperanto."

China and Japan.

The lecturer stated that she was instrumental in inaugurating the Peking Esperanto College which is now a flourishing Esperanto centre. In Shanghai local Esperantists charmingly performed a little play in the international language to a crowded assemblage in the Y.M.C.A. hall and at other times did much to further the interests of Esperanto in everyday life. In Canton university students taught "nia kara lingvo" to poor children as a regular subject; the same spirit seemed to prevail throughout China amongst the educated classes.

Most of the large Esperanto groups were sought out in Japan and addressed by Miss Root, notably Yokohama, Tokio and Shizuoka, and newspapers in Korea and the Phillipine Islands published her propaganda articles.

America.

In Rio de Janeiro, Brazil, Esperanto is being taught in all primary schools, one of the finest streets there has been named Zamenhof Avenue, the wonderful centenary exhibition was advertised all over the world by means of Esperanto circulars and pamphlets, and a telegram may be sent either in Portuguese or Esperanto at ordinary rates, while other languages cost three times as much. Numerous examples of progress in our movement in the United States

were then given and special mention was made that in New York Esperanto is instructed in Chamber of Commerce colleges and influential newspapers, such as the "New York Herald" deplored the fact that there were not enough teachers available to give instruction in Esperanto and urged professional teachers to study it with a view to further disseminating the language.

Broadcast in Australia.

During her sojourn of six days in Sydney, Miss Root gave nine lectures, and also succeeded in utilising wireless (as she had done in Perth and Melbourne) by broadcasting a propaganda talk about Esperanto. Listeners-in in all parts of Australia have reported hearing one or the other of Miss Root's lecturettes and Sydney Esperantists lost no time in sending "Applause Cards" to their broadcasting station asking for further Esperanto talks.

At the conclusion of the exceptionally interesting address, Mr. J. G. Pryke thanked the speaker for the pleasure she had given her audience and especially for her enthusiasm in furthering the aims and knowledge of Esperanto in such a remarkable manner. Mr. T. E. O'Donoghue supported Mr. Pryke, and several other members added words of appreciation.

Miss Root left for Hobart on October 14th and after traversing Tasmania intends visiting New Zealand. Much pleasure is therefore in store for the New Zealanders.

KONGRESAJ AFEROJ.

La jenaj sumoj estas ricevitaj de la hon-kasisto s-ro H. Byatt. Kongresaj pagoj:—n-o 49, R. Jones, 10/-; n-o 50, A. McKenzie, 21/-; n-o 29, s-ro Phillips, 6/-; n-o 51, A. Godfrey, 21/-; n-o 52, N. L. Byatt, 21/-. Donacoj:—M. Fraser, £3; Walking Club, 12/9; Eltham Picnic, 42/-; Glumar-koj venditaj, 10/6; Raciista Grupo, 17/1.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Gis la 30 novembro ni ricevis la jenajn sumojn:—J. Belsack, 13/6, junio '26; W. L. Waterman, 4/6, junio '25; F. Paulsen, 5/-, novembro '25; F. J. Williams, 4/6, junio '25; kontantaj, 6/6.

JOTTINGS FROM THE CONGRESS

Mrs. Scammell, of Sydney, addressed the Congress in English and Esperanto.

Dr. Ernst Horicky, speaking the name of the Chancellor, and Vice-chancellor, on behalf of the Republic of Austria, warmly welcomed the world wide congress of Esperantists to Vienna.

Dr. Emmerling, Vice-mayor Vienna, spoke highly of the value Esperanto in modern international technical affairs, and Radio.

Mr. Warden, Vice-president of the Akademio, in presenting the report of the section for competitions and awards, announced that the Akademio by a vote of its members, had premiated for the year 1924 the following works, Julio Baghy: "Preter vivo," original poem; Kolomano Kalocsay: translation of "Johano Brava."

Dr. Hanauer (Berlin) spoke forcibly on the necessity for an encyclopedia dictionary along the same line as that published by Kabe, and a technical dictionary following the methods of Scholomann. Dr. Dietter unstintingly praised the colossal work of E. Wuster, whose encyclopedic dictionary, so far has not elicited orders for 100 copies; s-ro Gluck supported Dr. Dieeelerle and regretted that the dictionary by Wuster gives the definitions in German instead of Esperanto, (If this dictionary had been published wholly in Esperanto there is little doubt it would have had a world-wide sale. (Red.)

In reply to a question by Dr. Blum, Mr. Warden informed the Congress that he hoped to have Dr. Zamehof's translation of the Bible published during 1925.

ESPERANTO AND RADIO.

Arrangements have been made to broadcast talks in Esperanto by 3L at regular intervals.

On the last Monday in each month 3A.R. will broadcast a talk and song in Esperanto. Due notice of the broadcasting program will appear in the daily press. Listeners in each country help by notifying the broadcasting stations as to the results obtained either by phone or letter.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata sinjoro,

Per tiu ĉi letero mi penos denove interesi vin pri la indiĝenoj de Aŭstralio, kiuj eble estas la plej primitivaj el la nunvivantaj homoj, kiuj kelkmaniere malkaŝas al ni la vivkondiĉojn de la prapatroj de la homa raso. Oni devas memori, ke la vivkondiĉojn en Aŭstralio dum la fruaj epokoj, estis tute alie, ol ĉe la aliaj kontinentoj, ĉar unue neniam troviĝis en Aŭstralio, sovaĝaj bestoj, kiuj estis danĝeraj por la homoj, kaj tute mankis bestoj taŭgaj por la homservado. Eĉ supozante, ke ekzistis bestoj taŭgaj por servi al la homoj, estas tute eble, ke la indiĝenoj ne utiligis ilin. Abundis la herbsemoj, kiujn li tage muelis, kaj faris al si primitivan panon, sed neniam venis en lian cerbon la ideo, semi la semojn, por provizi sin, kontraŭ la malsato. Almenaŭ pri kelkaj gentoj, estas fakto, ke ili tute ne scias la rilatojn inter la semoj kaj la kreskaĵoj, kaj opiniis, ke la kreskaĵoj kreskis, ĉar per magio li devigis ĝin fari tion.

Due, kaj eble pli grave, la Aŭstralia indiĝeno, neniam devis konkuri kontraŭ lia plibona raso. Li evoluis laŭ siaj propraj spertoj, sen la antaŭa puŝo ricevita pro konkuro. En Eŭropo la prahomoj devis konkuri kontraŭ la rinocero, tigro, urso, kaj la hieno, kaj tio pensigis kaj instruis lin. En Aŭstralio nenio pli timinda ol la giganta kanguruo, kiu estis tiel dezira savi sin, kiel la indiĝeno estis kapti kaj manĝi ĝin, kaj liaj samrasanoj konkuris kontraŭ li; kaj nur la klimataj kondiĉoj en kelkaj lokoj instruis lin en la observado. Pro lia izoleco la Aŭstralia indiĝeno restis primitiva.

Alia grava malhelpaĵo al progreso de la indiĝeno estis la ennaskita neantaŭzorgeco. Ili je tempoj sparas, kiam okazos dancfeston, kaj venos vizitantojn, al kiuj oni devas doni manĝi, sed kutime ili tromanĝas, kaj

poste malsatas, ĝis kiam denove abundas la nutraĵo.

Ili amas la hundojn, sed ne mortigas iom da la novnaskitaj hundidoj, por ke la ceteraj havu sufiĉe por manĝi, kvankam tre ofte ili ne povas doni al la hundoj manĝi.

La indiĝenoj estas ĉasistoj, kaj troviĝas tre malmultaj animaloj, kiujn ili ne volas manĝi, kaj la serpento estas por ili frandaĵo. Nenia animalo estas senhaŭtigata, ĉar laŭ sia opinio korpo malfermata estas malboniĝinta. Kiam animaloj abundas ili manĝas nur la membroj, kaj la karno ĉe la spino, kaj la ceteron donas al la hundoj, kiuj ĉiam estas multnombraj.

Personajn posedaĵojn ili neniam prirabas unu de la alia, sed strange estas, ke la ilojn, kiujn la posedanto mem faris li tute ne valoras, ilojn faritaj de aliulo ĉiam estas plibonaj.

La virinoj tre malofte portas longan hararon, ĉar estas ŝia devo fortranĉi ĝin por fari ŝnureton, kaj tion ili tre lerte faras, ne sole el la virina hararo, sed ankaŭ el hararo de diversaj animaloj, disŝiritaj folioj, kaj la ŝelo de arboj; la ŝnureton ili uzas por multaj aferoj, sed precipe por fabriki retojn por la fiŝkaptado, kaj tiuj retoj ofte atingas la longecon da 70 futoj, largecon da 7 futoj.

Antaŭ nelonge mi vizitis la lagdistrikton de Viktorio, kie nun loĝas la restantaj indiĝenoj de tiu ĉi ŝtato. La registaro provizas la indiĝenojn per bonaj domoj, vestoj, kaj nutraĵoj, kaj ĉio necesa por la komforta vivo, ankaŭ ili ricevas bonan edukon, kaj povas paroli angle kvazaŭ angloj. Ne estas necese por ili labori, sed se ili volas fari tion, ili ricevas farmon, kaj la necesajn ilojn, kaj povas gajni al si monon. Por amuzi la vizitantojn, ili faras fajron, kaj jen la metodo, la laboranto sidas kun peco da ŝtupo en kiun li jam borus truon, inter la genuoj, li prenas bastoneton, kies grandeco ĉe la fino estas same kiel la truo, tiun sekigitan bastoneton li tre rapide turnas per

HAROLDO PUDNEY**Kuracisto de Fonto-Plumoj**

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

rulado inter la manplatoj, kaj tion li devas fari dum eble kvin minutoj, tiam aperos fajrerojn, kiujn li kaptas sur pecon da tre seka kaj disŝirita ŝelo, kaj blovekcitas ĝin, ĝis venos la flamo; mi ekbruligis mian cigaredon per tia flamo.

Aliaj ĵetas la bumerangon; kutime kiam la bumerango estas lerte ĵetita, ĝi iras laŭ granda cirklo, poste per plimalgranda cirklo, kaj fine falas proksime al la ĵetinto. Mi aĉetis bumerangon, kaj la afabla vendisto penis instrui min pri la ĵetarto, post kelkaj penoj mi povis ĵeti ĝin tiel, ke ĝi iris eble triono da cirklo, sed ne sukcesis revenigi ĝin proksime al mi.

La indiĝenoj estas tre lertaj je la elsekvado, ili povas sekvi la spuron de homo aŭ besto tra senvojaj lokoj, kaj la polico ofte uzas ilin por postkuri krimulojn, kiujn ili tre ofte kaptas.

Kun bondeziro, via fidele, P. H.

RECENZOJ.

SES NOVELOJ, el "Rakontoj de Mistero kaj Imago," de Edgar Allen Poe, el la angla originalo tradukis A. Frank Milward. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Inter verkistoj en la angla lingvo E. A. Poe ne estas elstaranta ekzemplo pro sia flua stilo. Ne estas surprize, do, ke ĉi tiu libro ne estas tiel facile legebla, kiel aliaj, kiujn oni senpene rememoras. La tradukinto bone konservas la misteran, melanĉolian, malgajan atmosferon de la originalo. Eble la temoj de Poe ne estas al ĉies gusto, sed tion oni povas diri pri preskaŭ ĉiu verkisto, sed estas certa, ke kiel multaj angloj, tiel multaj esperantistoj, ĉu pro sato, ĉu por informiĝi, legos la libron nun metita al ilia dispono. (C.W.B.)

LA MALSPARULO, de Ferdinand Raimund, originala sorĉfabelo en tri

aktoj, tradukita el la germana lingvo de F. Zwach. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Ĉi tiu teatraĵo estis ludata en Vieno dum la XVI Kongreso, se ŝajne al negranda aŭdantaro. Feliĉe la tutmonda Esperantistaro povas legi ĝin en la nuna bonega verko. Pro ĝia intereso, kaj pro ĝia fundamente, simpla stilo ĝi estas eminenta taŭga kiel legolibro kaj estus bone incitilo al la legado por ĉiuj nemulte progresintaj studentoj. La tradukinto, en antaŭparolo, donas mallongan skizon de la vivo kaj laboroj de Raimund, kio tuj metas la leganto en simpatian kun la verko. Al tradukinto kaj eldonanto gratulojn pro ilia donaco al nia literaturo. (C.W.B.)

DEKLARACIO, de T. Ariŝima. Tradukita el la japana originalo de T. Tooguu. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Jen moderna japana verko tradukita en Esperanton de japano. Note de d-ro Dietterle klarigas, ke tiu libro estas la unua ampleksa Esperanto-tradukaĵo el la japana literaturo kiu aperas en eldonejo de la eŭropa kontinento, kaj, ke por ne difekti ĝin li lasis la ĉarman originalecon de la stilo de nia samideano Tooguu tute netuŝitan. La libro (123 paĝoj) estas en formo de leteroj inter du amikoj, kiuj amas la saman junulinon. La verko estas ĉarma, alloga, kaj komencinte ĝin oni volas tuj legi ĝin la fino. (C.W.B.)

KEINOTEKOISEN YHTEISKIELEN MAHDOLLISUUKSISTA JA ESPERANTOSTA. (Pri la eblecoj de artefarita komunlingvo kaj Esperanto). Represaĵo el parolado de H. Salokannel, Laihia, Finnlando.

En la unua parto de la libreto la aŭtoro priskribas ecojn postulatajn de internacia helplingvo, kaj en la posta parto lerte pravas, ke Esperanto tute plenumas ĉiujn postulaĵojn. Efika nacilingva propagandilo. L.L.

GLUMARKOJ for your correspondence. GLUMARKOJ

A new and original design in two colours. Distinctly Australian.
SIXPENCE PER PACKET OF 25.

The entire proceeds will be donated to the fund of the 5th Australasian Congress, Easter, 1925, Melbourne.

Secure your ticket for the congress early: Hon. Librarian, Melbourne Esperanto Society, Box 731, P.O., Elizabeth Street.

PRI AŬSTRALIAJ INDIGENOJ.

S-ro David Unaipon verkis la jenan artikolon por la Sidneja "Daily Telegraph" frue en 1924. La verkinto estas plensanga indigeno, kiu naskiĝis en Suda Aŭstralio. Edukita inter blankuloj, s-ro Unaipon fariĝis brila klerulo. Li legas la greklingvon, kaj latinon, estas bonega parolanto, kaj ludas bele la fortepianon. Li ankaŭ estas elpensinto de kelkaj interesaj meĥanikaj iloj.

—Pritraktante la tradiciojn, kaj morojn de mia raso, estas nur lōgike kaj dece, ke mi komencu kun la tradicio pri nia alveno en Aŭstralion. La indigenoj ĉiam sciis la kvar punktojn de la kompas, kaj la kvar ventojn de la tero: "Wallound" (la norda), "Kollkomi" (la suda), "Tollcomi" (la okcidenta), kaj la "Orrami" (la orienta). La tradicioj diras, ke la indigenoj venis el la nordokcidento. La vojo de nia veno kredeble estis laŭ terkolo, kiu jam de longe profundigis sub la maro. Tiu ŝajnis akordi kun la scienco, ke Aŭstralio iam estis parto el la granda kaj malnova kontinento nomita Lemuria. Ni enmigris aŭ devigis eniri Aŭstralion per ferocaj formikoj la "Prald-arnaprodna." Ĉi tiu eble signifas, ke niaj prapatroj estis persekutataj per plago de grandegaj formikoj, aŭ per prahistorio raso tiel feroka, kaj multnombra, kiel formikoj.

—Veninte al Aŭstralio antaŭ kelkaj miloj da jaroj, kredeble malmulta aŭ nenia ŝanĝo efektiviĝis en la kutimoj, kaj moroj de mia popolo. Niaj gentaj leĝoj kaj moroj estas fiksitaj, kaj neŝanĝeblaj.

La sama genta edukado daŭris generacion post generacio. "Narrandarrrie" elstaris, kiel tradicia ĉefo. La leĝoj de Nar-ran-darrie" estas instruataj al la infanoj en ilia infaneco. La ĉaslokoj estis sciigitaj al la diversaj triboj, kaj gentoj de "Nar-ran-darrie." La infanoj aŭdas de siaj gepatroj ĉiujn tradiciajn legendojn pri nia raso, ili lernis la scion kaj lerton de arbara metio, kaj ĉasado, samtempe ankaŭ trapasante la tri grandajn pruvojn aŭ iniciojn al "Kornmund" aŭ plena vireco, kaj "Meemund" plena virineco, kiu ordinare pleniĝas je la 18a jaro.

La unua pruvo estas venki la malŝaton per marŝado aŭ ĉasado dum du tagoj sen manĝo, kaj tiam subite es-

ti kondukata antaŭ fajro sur kiu kuiriĝas ia bongusta peco da kanguro aŭ alia indigena frandaĵo. La sekvanta pruvo estas venki la doloron. La junaj knaboj, kaj knabinoj sin cedas al trapikigo de siaj nazoj, tranĉmarkigo de siaj korpoj, kaj kuŝi sur varmegaj cindroj maldike kovritaj per branĉoj. La tria pruvo estas venki la timon, oni rakontas al la gejunuloj timigajn, kaj terurajn historiojn pri fantomojn, kaj la "Maldar-pee," la malbona spirito aŭ la super diablo (devil-devil). Post tio ili devigis dormi en izola loko aŭ proksime al la enterigejo de la tribo. Dum la nokto la maljunuloj, malbeligitaj per blanka koto, kaj ŝelaj kapkovraĵoj aperas farantaj strangajn bruojn. Tiuj, kies aspektoj ne evidentigas maltrankvilan ripozon dum la nokto, estas poste akceptataj, kiel plenaj iniciitoj de la gento.

Neniu junulo aŭ junulino estas permesata edziĝi ĝis li aŭ ŝi trapasis ĉi tiujn pruvojn.

Tradukis Godoko.

GRAVA DECIDO DE LA LIGO DE NACIOJ.

La Ligo de Nacioj denove okupis sin pri Esperanto.

Subtenite de la delegitoj nederlanda, hina, japana kaj persa, la 20 septembro 1924, la Dua Komisiono de la L. d. N. akceptis kun 13 kontraŭ 10 voĉoj la jenan rekomendon al la Plena Kunsido de la Ligo:

"La Ligo de Nacioj rekomendas al la ŝtatoj, membroj de la Ligo, ke ili konsentu al Esperanto la traktadon kaj tarifon de klara lingvo en la telegrafa kaj radiotelegrafa servado kiel praktika helpa lingvo de la internaciaj interkomunikoj flanke de la naciaj lingvoj uzataj."

Ni ĵus ricevis telegramon el Geneve, dirantan ke la Plena Kunsido de la Ligo akceptis tiun ĉi proponon.

Oni devas gratuli la ŝtatdelegitojn pro tiu larĝvida decido. Estas sendube, ke tiu rekomendo al la ŝtatoj apartenantaj al la L. d. N. senteble influos en estonto la sintenadon de poŝt- kaj telegrafinstitucioj al Esperanto.

La rezolucio en sia formo reprezentas oficialan rekonon de Esperanto per la Ligo de Nacioj.

El Esperanto Triumfonta.

KRONIKO.

Hobarto, Tasmanujo.—Je la kunveno okazinta 7 oktobro, Gedoktoroj Williams, el Melburno, vizitis la grupon. D-ro Williams antaŭ ne longe revenis de la insuloj "New Hebrides," kie li laboris, kiel misiista kuracisto. Li paroladis pri la bezona en tiuj insuloj pro la multaj dialektoj, de ia lingva komunikilo, kiel Esperanto.

Dum li laboradis en la hospitaloj, ĉe Melburno, li pruvis la grandan valoron de Esperanto, ĉar tie malsanuloj el diversaj nacioj estas akceptataj, kiuj ne povas paroli angle, sed povis sin komprenigi pere de la internacia lingvo. La grupo multe ĝuis la viziton de la novgeedzoj.

Adelaido, Suda Aŭstralio.—La ĉi tiea ĵurnalo, "The Mail" en la lasta numero enhavas artikolon pri la decido de la "American Radio Relay League" subteni Esperanton, por internacia radio. Vizitis nin f-ino M. L. Root kiu faris kelkajn paroladojn pri Esperanto ĉe kunvenoj, kaj interesis la ĵurnalistojn, kaj tiamaniere Esperanto ricevis bonegan reklamon lastatempe.

Following Miss M. L. Roots talk to the Bahaiists and Theosophists, a class for Esperanto, to be instructed by W. L. Waterman and others, commenced at the latter's rooms on Monday, 17th inst., with 15 members.

"Daylight" regularly publishes a column about Esperanto, and the Editor offered one of his rooms free of charge, for use as a class room.

The C.O.P.E.C. circle has carried the following resolutions:—

"That this circle recommends the Executive to invite the members of the League of Nations Union, and other leading citizens, to join them in a deputation to the Premier, requesting him to urge the Federal Government to petition the League of Nations to approve a World Auxiliary Language, so that the people may learn it."

"That this circle complies with a request to grant its patronage to a class for the teaching of Esperanto by Professor Uhrlaub, to be held in the Chamber of Arbitration, Eagle Chambers, Adelaide."

Melbourne, V.—A largely attended gathering said farewell to Dr. F. Williams—who is leaving for China—at the meeting of the Melbourne Esper-

anto Club on Wednesday, 26th November. Regrets were expressed at the departure from our shores of an enthusiastic worker for Esperanto. During the evening Dr. Williams was presented with a parcel of Esperanto books. We all feel the loss of a consistently energetic supporter of the movement and feel sure that he will continue the work among the Chinese. The good wishes of the Esperantaro will follow Dr. Williams in his new sphere.

The 15th December is the anniversary of the birthday of Dr. Zamenhof the author of Esperanto, and to commemorate same a program of Music and Drama in Esperanto will be given, at the Independent Hall, Collins Street, near Russell Street at 8 p.m., on Monday, 15th December.

Half of the program will be rendered by school children of sixth grade. This presentation by children is a unique opportunity for hearing Esperanto spoken and sung. Tickets 2/2 may be obtained from the Hon. Sec., R. R. Rawson, 212 Swarston Street, or from group secretaries. The proceeds are for the Esperanto Congress, Easter 1925.

NOVAJ FAVORAJ REZOLUCIOJ
POR ESPERANTO.

La Unua Brazilia Kongreso de Koltoscienco, okazinta en Rio de Janeiro dum aŭgusto, aprobis unuanime la jenan rezolucion prezentitan de Dr. Carlos Domingues: "Devas esti enmetita en komercajn kursojn la instruado de la internacia lingvo Esperanto, kiel helpa mondlingvo," sola efika solvo de la grava problemo de la internacia kompreno.

La raportinto estis D-o Figueiredo de Mello, vicdirektoro de Komenc Akademia en Rio de Janeiro.

A. Couto Fernandez, Rio de Janeiro.

Monda Institucio de Nepersona Vivo, Mexico D. F.

En Meksikurbo (Meksiko D. F.) filozofoj kaj teozofoj ĵus fondis "Institucion Mundial de la Vida Imperiala." En artikolo 6 de ĝia statuto ĝi akceptis jenan decidon: "La Asocio elektas Esperanton kiel oficiala helpa lingvon de la institucio; tiu lerno estas deviga por instruistoj kaj por la direktanta grupo."

Esperanto ĉe la poŝto en Estonio.

Dank' al siatempa peticio de Ileptoj, rekomendinta la akcepton de Esp., almenaŭ provizoran, apud la franca kaj angla lingvoj en la internacia kaj ĝiĉeta servoj de la Poŝto kaj Telegrafo, la Poŝt—kaj Telegraf-administracio de Estonio interrilatinte kun la Trafikministerio decidis laŭeble translokigi la esp. parolantajn oficistojn je oficoj, kie oni havas okazojn interrilati kun la publiko, parolanta fremdajn lingvojn.

Nun, konforme al tiu decido, en Estonio, almenaŭ en la ĉefaj poŝta kaj telegrafa oficejoj en Tallinn (Reval) ĉe paro da ĝiĉetoj troviĝas inform-afiŝetoj en tri lingvoj: estona, franca kaj esperanta kun la surskribo: "Tie ĉi Esperanto estas parolata."

Estas notinde, ke la kompreno de l' esperanta teksto de l' peticio kaj la por nia movado favora decido okazis sen ia perado de lokaj esperantistoj.

III. Ĝenerala Kongreso de la Hebrea-skoltista Asocio.

Tiu asocio kiu havas ĉirkaŭ 4000 membrojn en 36 polaj urboj kaj filiojn en Latvio, Rumanujo, Bulgario, Palestino k. a. akceptis dum sia kongreso en Warszawa (25—28. 8. 24) unuvoĉe la jenajn rezoluciojn:

1) Ke en interrilatoj kun la eksterlanda nehebrea skoltistaro oni uzu la lingvon internacian Esperanton kaj.

2) Ke en Internacia Korespond-kaj Interŝanĝ-klubo estu la oficialaj lingvoj: hebrea kaj Esperanto.

Koresponda Fakestro, trupestro kaj del. de UEA en Sieradz, Polujo, Jozef Sztulman el Esperanto Triumfonta.

THE DANCE OF DEATH.

A remarkable story is told by a correspondent who lives near one of our southern mountains. It concerns the manner in which "scrub-turkeys" are said to attack snakes,

he says, it is confidently related by bushmen, that the big birds have been seen to dance about a snake in a most extraordinary and spectacular fashion. In a particular case, it is said, the birds stalked round and round the reptile as it coiled at bay, and with every revolution the circle got narrower. For awhile the snake lay as if fascinated, then it made a sudden move, instantly the largest turkey darted forward and gave it a vicious peck. Then it stepped back into the rank and the strange dance went on. Every time the snake moved the pecking process was repeated, first by one bird, then by another, and narrower and narrower grew the circle until the space was covered and the birds had closed around the bewildered and badly injured snake. Finally a combined assault was made, the dance of death was over and the snake lay inert and crushed.

LA DANCO DE L' MORTO.

Rimarkinda historio rakontas korespondanto kiu loĝas apud unu el niaj sudaj montoj. Ĝi pritraktas la manieron per kiu sovaĝaj meleagroj atakas serpentojn. Li diras, ke estas fideinde dirata de arboristoj, ke la grandaj birdoj estas vidataj danci ĉirkaŭ serpento en tre eksterordinara, kaj spektakla maniero. Citi okazon, oni diras, la birdoj ĉaspaŝis plurfoje ĉirkaŭ la reptilo dum tiu sindefendante volviĝis, kaj je ĉiu ĉirkaŭiro la cirklo pli mallongiĝis. Dum iom da tempo la serpento kuŝis kvaraŭ enŝorĉita. Tiam ĝi subita ekmovis, tuj la plej granda meleagro sin ĵetantaŭen, kaj feroce ĝin bekfrapis. Poste ĝi repaŝis en la vicon, kaj la stranga danco daŭris. Ĉiufoje, kiam la serpento sin movis la bekfrapa procedo estis ripetata unue de unu birdo, tiam de alia; kaj plue la cirklo malgrandiĝis ĝis la spaco estis kovrita, kaj la birdoj enfermis la konfuzatan, kaj tre vunditan serpenton.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders.

See Testimonials.

For Children and Adults.

Price Per Packet: 3/8 Posted.

Australian Agent: A. R. COHEN, 12 DERBY STRET, KEW.

Fine kombina atako estis farata la danco de l' morto finiĝis, kaj la septento kuŝis inerta, kaj mortpekita.

El "Nowra Leader," tradukis Ĝodo-ko.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Aŭstria Esperantisto, n-o 2; British Esperantist, n-o 234, 235; Belgia Esperantisto, n-o 5-6; Esperanto Triumfonta, n-o 210 ĝis 214; Espero Katolika, n-o 1; France Esperanto, n-o 30; Internacia Komercio, n-o 17; International Language, n-o 9, 10; Kristana Espero, n-o 3-4; La Espero, n-o 8-9, 10; La Unuigita Tutmondaro, Sep-Okt; Literaturo, n-o 23; La Interligilo de L'P.T.T., n-o 11-12; Revuo, n-o 9; Sennaciulo, n-o 1; Volker Spiegel, n-o 16.

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburno Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. L. Clarke; sekretario, s-ro J. G. Robert. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Club Chambers, 350 Little Colline-str.; vendrede vespere, je la oka horo.

A.N.A.- Grupo, Oakleigh. Prezidanto: sinjoro W. Quinlivan; sekretario, sinjoro D. Thomson, poŝta adreso: ĉe British Imperial Oil Co., 153 William-str., Melbourne. Kunvenejo: Mechanics' Institute, Oakleigh, lunde vespere je la oka horo.

Brisbane Esperanto Club. Sekretario S-ro A. J. Sycamore, C/- Mr. W. Hartley, Carlton St., Highgate Hill, Sth. Brisbane. Address enquiries to Secretary, who may be seen between 12 noon and 1 p.m. at Murray Fraser Ltd., Charlotte St., City.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunvenejo kaj poŝta adreso: ĉe F-ino Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd. Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Societo. Prezidanto, S-ro Alfred Gregory; Sekretario, S-ro R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kunvenejo: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa horo.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrig Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str.; Victoria Park, W.A. Kunvenejoj vespere je la oka horo. "Perth Academy," komencantoj merkrede; progresintoj, 9 Pier-str: ĵaŭdo.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 62 Northcott Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta. Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario, S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunvenejo: La domo de S-ro Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Raciista Esperanta kaj Diskutista Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie; sekretariino, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str. North Carlton, Melbourne. Kunvenejo, Temperance Hall, Russell-str. Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.